

Heinrich Heine,
Lorelay

*tradukita de Hans-
Georg Kaiser*

Min kaptas malgaj'
en la koro,
pro kio tia trist'?'
Fabel' el antikva foro
ne lasas de mi kun
persist'.

Aere fridetas, trank-
vilas,
malhelas jam la Re-
jn'.
La monto surpinte
brilas
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,
jen supre por ador';
la ora ornamo ridas;
ŝi kombas harojn el
or'.

Ŝi kombas per ora
kombilo
kaj kantas kun pasi';
mirigas min la elbrilo
kaj forto de l' melodi'.

...

Heinrich Heine,
Lorelej

*tradukita de Ludwig
Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial sub-
ita
malgaj' en la koro
naskiĝis;
el tempo jam enteri-
gita
legendo al mi revi-
viĝis.

Jam malvarmetiĝas l'
aero,
la Rejno mallaŭte ba-
bilas,
per oro de l'sun' en
vespero
la supro de l' monto
rebrilas.

Plej belan knabinon
mi vidas:
en ora ornamo bri-
lante,
sur supro de l' monto
ŝi sidas,
la harojn mistere
kombante.

La oran kombilon ŝi
movas
kaj kantas tra l' pura
aero,
kaj forto mirinda sin
trovas
en tiu ĉi kant' de
l'vespero.

...

Heinrich Heine,
Lorelejo

*tradukita de Joachim
Gießner*

Malgajon mi sentas
en koro,
sed kial tia tim'?'
Legendo el pratempa
foro
Vagadas tra mia
anim'.

Jam fluas la Rejn' en
malhelo,
kaj malvarmetas l'
aer'.
Sed brilas la mont' en
orbelo
pro suna lum' de l'
vesper'.

Jen supre kabino pro-
vokas
per ora juvelar',
kaj ŝia beleco allogas
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas
sorĉige,
sirene kantas ŝi
per neimagebla, miri-
ge
potenca melodi'.

...

Heinrich Heine,
Die Lorelei

Ich weiß nicht, was soll es
bedeuten,
daß ich so traurig bin;
ein Märchen aus alten
Zeiten,
das kommt mir nicht aus
dem Sinn.

Die Luft ist kühl und es
dunkelt,
und ruhig fließt der
Rhein;
der Gipfel des Berges fun-
kelt
im Abendsonnenschein.

Die schönste Jungfrau sit-
zet
dort oben wunderbar,
ihr goldnes Geschmeide
blitzet,
sie kämmt ihr goldenes
Haar.

Sie kämmt es mit golde-
nem Kamme,
und singt ein Lied dabei;
das hat eine wundersame,
gewaltige Melodei.

...

Ŝipisto ŝipeton gvidas, lin kaptas ve' de ekzalt'. Li ja la rifojn ne vidas', li vidas nur suprensen halt'.	Ŝipet' iras sur la rivero, ŝipisto ekstremis de l' kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kantanto.	Ŝipiston en eta boato Turmentas koremo-ci'. Ne ĝenas lin rifikaskado, rigardas nur supren al ŝi!	Den Schiffer im kleinen Schiffe ergreift es mit wildem Weh; er schaut nicht die Felsenriffe, er schaut nur hinauf in die Höh.
--	---	---	---

Mi kredas, ke ondoj tiras la ŝipon funden de l' Rejn'; kaj tio de l' kant' eliras de Lorelaj-siren'.	Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l' akvoturnado; ĝin Lorelej' faris kruela, per sia mirinda kantado.	Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo la ondoj lin kun boat'. Nun kuŝas li en la profundo pro Loreleja kantad'.	Ich glaube, die Wellen verschlingen am Ende Schiffer und Kahn; und das hat mit ihrem Singen die Lorelei getan.
--	--	--	--

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 - †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kantokolekto "Mia kantaro I", eldonita de Josef Schiffer (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: Josef.Schiffer@t-online.de), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo "Fervoja Esperantisto" de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17), publikigita 1823.*

Arg-2-2 (2014-04-23 18:09:02)

Aus dem Werk "Buch der Lieder", Kapitel "Die Heimkehr", Abschnitt II. Siehe auch ein <http://gutenberg.spiegel.de> unter: http://gutenberg.spiegel.de/?id=58&d=1131&kapitel=12&hash=eb14eca2272#gb_found. Vidu ankaŭ: http://www.gedichte.vu/?die_lorelei.html. La melodion verkis la komponisto Friedrich Silcher. Vidu la retejon http://www.lieder-archiv.de/die_lorelei-notenblatt_300493.html.